

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



60a jaro n° 3
majo - junio 1968


Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :
Dr. Pol Denoël Durwael Ivo Iserentant Roger

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO & PREZIDANTEJO
Debruynga 44, Wilrijk Tel. (03) 27425

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO
Kempeneers Paul Stelens Henri

GENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice

PREZIDANTOJ
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

UNUA VICPREZIDANTO
Roose Fernand

VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEKNIKAJ RIMEDOJ

GENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTINO Terryn Juliette, Raapstraat 72 Gent - Tel. (09)255381

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 RAAPSTRAAT 72, GENT

CEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2
P.K. 9051 25

50A JUBILEA BELGA KONGRESO DE ESPERANTO

60 jara Jubileo de Brusela Grupo Esperantista
en Bruselo dum Pentekosto, la 1-a, 2-a kaj 3-a de junio 1968.

Se la organizantoj de la 50a Jubilea Belga Kongreso povas esti absolute kontentaj pri la valora helpo de iuj inter siaj kunlaborantoj, sendube estas pri la helpo de la "veterprizorgantoj". Ĉar dum la tuta kongreso regis varma, plensuna kaj agrabla vetero kiu nekontraŭstareble influis la diversajn manifestaciojn kaj - tre grave - la bonhumoron kaj la konduton mem de la gekongresanoj...

Sed oni parolos pri la 50a Belga Kongreso, oni-samtempe - ĝin rememoros kiel la "flora kongreso". Efektive dum la solena kunsido je la honoro de la Brusela Grupo, okaze de ĝia 60-jara jubileo, floroj ĉie abundis... Floroj kaj suno... ĉu oni povas atendi pli kiel kadro por jubilea kongreso?

Vere la kongresanoj plene ĝuis la sferon kune kun programo al kiu laborema kaj senlaca LKK donis siajn plej bonajn fortojn jam dum monatoj antaŭe. Ĝi akceptu nian varman kaj sinceran dankon.

Sabaton, je tagmezo en la kongresejo, Hotelo "Des Colonies", rue des Croisades / Kruisvaartenstraat Bruselo, la ĝiĉetoj jam malfermiĝis por bonvenigi la unuajn alvenintajn kongresanojn. Sin anoncis britoj, francoj (malgraŭ la drama situacio en -tiu lando), nederlandanoj, germanoj, monakanoj: do, vere internacia publiko. Afablaj bruselaj esperantistoj deĵoris kun la rideto sur la vizaĝo. En la - tuj apuda - Norda Stacidomo speciala sekcio de la LKK akceptis la gekongresanojn kiuj alvenis vagonare.

Je la 13,30a horo POŝTA ĜIĈETO malfermiĝis kun speciala stampo memore al la 50a Esp.-Kongreso. Ĝi havis grandan sukceson ĉar la poŝtovicistoj konstante deĵoris por kontentigi siajn klientojn.

Dum la INSTRUISTA KUNVENO, je la 14a horo en la kongresejo, multaj interesitoj ĉeestis kiam D-ro P. Denoël el Lieĝo preparolis sian projekton pri leĝpropono por enkonduki Esperanton en la lernejoj. La paroladisto, kiu prezidis la kunsidon, havas firman esperon por efektiva sukceso en la tuja estonteco.

Ankaŭ la BELGA ESPERANTISTA JUNULARA ASOCIO (B.E.J.A.) kunvenis; tamen malmultnombro pro malĉeesto de la gemembroj malhelpataj pro ekzamena studado.

Je la 15,30a h. BELGA ESPERANTO-FEDERACIO havis sian administrantan kunsidon kie oni preparolis la organizon de la venontjara Belga Kongreso. Principe estos en Strasbourg en kunlaboro kun Germana Esperanto-Asocio kaj kun Franca Unuiĝo por Esperanto.

Je la 16,30a h. okazis la OFICIALA MALFERMO. S-ro R. Jacobs, kiel prezidanto de la LKK en kunlaboro kun S-ro G.C. Fighiera, bonvenigis la kongresanaron per koraj vortoj kaj tuj transdonis la parolvicon al S-ro M. Jaumotte, ĝen. prezidanto de BEF. Li faris la inaŭguran paroladon. Siavice li bonvenigis la ĉeestantojn, dankis la LKK-on por la prepara laboro kaj kun entuziasmo parolis pri la projekto, verkita de D-ro P. Denoël, kaj celante la oficialigon de Esperanto en la lernejoj. Li

anoncis la tutan apogon de BEF kaj metas la finanĉan **helpon de la "Fondajo Jaumotte-Loquet"** je la dispono por sukcesigi la tutan entreprenon, unu el la plej realistaj de la lastaj jaroj.

Li ankaŭ sciigis la nuligon de la OFICIALA AKCEPTO EN LA URBO-DOMO pro eblaj studentaj demonstracioj sur la Granda Placo kaj la nantaŭvideblaj sekvoj. La ĉef-polica komisario persone informigis la LKK-on.

La FESTPAROLADO de Lia Ekscelenco R. Harry, Ambasadoro de Aŭstralio en Belgujo temis pri "Esperanto kiel lingvo por diplomatoj". En ĝi la paroladisto, per klara lingvo kaj bela stilo, montris la diversajn eblecojn en kiuj Esperanto povus ludi utilan rolon en la diplomatio. Li rakontis kelkajn realajn faktojn kiujn li mem spertis kaj el kiuj evidentiĝis la praktika valoro de Esperanto. Konklude li konfirmis sian bonan volon propagandi Esperanton en sia medio kiel eble plej multe. Tondra aplaŭdo aŭdiĝis kiam la festparoladisto ree sidiĝis.

Por anstataŭi la neeblan akcepton en la urbodomo, oni faris aŭtoĉaran rondveturadon en Bruselo kun gvida komentario de S-ino Elly Staes kaj S-ro F. Debaene.

Dumvoje, sur la ŝtuparo antaŭ la monumento de Reĝo Alberto I, la kongresanaro estis regalata je festa muziko fare de la fervojista orkestro de Antverpeno. Post dankvortoj de la ĝen. prezidanto OFICIALA FOTOGRAFADO okazis el kiu rezultigis bele sukcesinta fotografajo.

Je la 21a horo la ARTA VESPERO, starante sur alta, kultura nivelo, estis enkondukata de S-ino Ada Fighiera, kiu plenumis ankaŭ la rolon de la paroladistino. Laŭ lerta senĝena maniero ŝi anoncis la diversajn programerojn. Bedaŭrinde la franca aktorino, S-ino J. Ravšeli-Flego, ne ĉeestis pro la socia malordo kiu regas en Francujo. S-roj Petro De Smedt kaj B. Weber anstataŭtis ŝin dum diversaj fojoj per kvarmana pianoludado. Ili akiris entuziasman aplaŭdon.

Sed la famkonata (certe per la radio), arta kantistino S-ino Alice Van Wallegem, akompanata ĉe la fortopiano de sia edzo S-ro J. Van Wallegem, aŭdigis - esperantlingve - aron da internaciaj kantoj: rumana, greka, itala, flandra, hispana kaj skota. Ŝi havas belegan voĉon. Sia sinprezentado estas simpatia kaj impona (longa, verda festvestaĵo) kaj ŝia konduto natura kaj eleganta. La ĉiama rido neniam malaperas de la vizaĝo dum ŝi kapablas solene danki por la aplaŭdo per graciaj gestoj...

Sia filino priludas la harpon: klasika, impona muziko en la unua parto, neatendita, moderna ludado (iom jaz-forma) kun surprizaj rezultoj en la dua parto. Belegaj ruĝaj rozoj estis donataj al la du artistinoj fare de F-ino Jeannine Jacobs.

Jam estis malfrue kiam la fino venis. La kongresanoj rapidiĝis al la hotelo por dormi aŭ ili preferis gustumi lastan freŝan glason da biero.

Dum la dimanĉo, denove sunplena, la programo estis enkondukata per la SANKTA MESO en la preĝejo Sanktaj Johano kaj Nikolao en la Brabantstrato, tre apude de la kongresejo.

Pastro Prof. Saen ĝin celebris helpitaj de S-roj E. Paesmans kaj I. Durwael. La tuta meso estis en Esperanto, same kiel la prediko. Estis multaj ĉeestantoj kiuj atente sekvis la tuton dum S-ro Jo Haazen

en la komenco, sed precipe je la fino, ludis orgenon kun brila talento.

Akurate je la 10a horo la granda kongresa salono estis plenplena je kongresanoj por ĉeesti la SOLENAN JUBILEAN KUNSIDON de la Brusela Grupo Esperantista kiu festas sian 60-jaran ekzistadon.

S-ro M. Jaumotte malfermis la solenan kunsidon kaj, enkonduke, laudis Pastron Saen kun liaj kunlaborantoj kaj S-ro Jo Haazen pro ilia belega, impresplena, ĵus okazinta Di-servo.

S-ro R. Jacobs, prezidanto de la Brusela Grupo, faris la historian retrospektivon de la grupa vivo kaj post multaj detaloj transiris al la honorigo de la jubileantoj kies nomojn oni povas trovi aliloke.

La grupa prezidanto sinsekve laŭdis la meritojn de ĉiu jubelanto kaj floroj - floroj en diverskolora abundeco - estis donacataj al la festitaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj, same kiel belegaj libroj al la festitaj sinjoroj. Dro P. Kempeneers, honora prezidanto la Reĝa Brusela Grupo senkulpiĝis kaj telegrame gratulis. S-ino Elly Staes, laŭ tre humorplena maniero, dankis nome de la jubileantoj.

Poste prezidanto Jaumotte invitis la delegitojn - unue la alilandanojn, poste la diversajn enlandajn grupojn - por gratuli kaj bondeziri la jubileantan grupon kune kun ĝiaj gemembroj.

Parolis por la britoj: S-ro F. Curtis; por la francoj: S-ro L. Giloteaux; por la monakanoj: S-ro J. Derckx; por la nederlandanoj: S-ro H.E. Kervers; por la Verda Stelo kaj La Rekta Vojo: S-ro J. Verstraeten; por Bruĝa Grupo Esperantista: S-ro Ch. Poupeye; por Paco kaj Justeco: S-ro R. Iserentant; por Genta Klubo Esperantista: S-ro A. Van de Velde; por Lieĝa Grupo Esperantista: D-ro P. Denoël; por Karlo-reĝa Grupo Esperantista: F-ino A. Orsolini; por Lovena Grupo Esperantista: S-ino A. Meurrens; por Verviersa Grupo Esperantista: S-ro J. Hérion kaj por BEJA: F-ino A. Geelen.

Nome de B.E.F. prezidanto Jaumotte gratulis kaj substrekis la amikajn samideanajn sentojn kiuj montriĝis dum tia solenajo. Amaso da freŝaj, belaspektaj floroj, kune kun donacoj plej diversaj, plenigis la salonegon kaj kreis vere festan kaj emociplenan sferon.

S-ro R. Jacobs finfine dankis pro tiom da amikajoj kaj nome de la grupo, la gemembroj kaj de sia edzino li esprimis sian profundan agnoskecon kaj simpatian. S-ro G. C. Fighiera pluklarigis la evoluon de la programo kaj substrekis la ĉefajn atentigendajn punktojn.

S-ro Jaumotte proponis - jam kongresa tradicio - kunmeti la Honoran Kolonon por la sekvontjara Belga Esperanto-Kongreso kiu okazos en Strasbourg (Francujo). 46 Gekongresanoj respondis al la prezidanta alvoko kaj enskribiĝis! Oni do povas paroli pri unua grava sukceso.

Tiam S-ro M. Jaumotte invitis la ĉeestantojn en apudan salanon por trinki la honorvinon. Baldaŭ regis gaja sfero kiu pligrandiĝis ankoraŭ post la komuna toasto je la honoro de Brusela Grupo kaj de BEF. Agrabla - pli brua ol kutime - interbabilado antaŭiris la tagmanĝon kiun la plej granda parto de la ĉeestantoj gustumis surloke.

Samtempe kun la jubilea kunsido de Brusela Grupo - en alia salono - kunvenis la BELGA ESPERANTISTA FERVOJISTA ASOCIO (BEFA).

Dum la libera posttagmezo pluraj geinteresitoj VIZITIS LA MUZEON DE NATURAJ SCIENCOJ sub gvidado de D-ro Wim De Smet kiu klarigis la multajn objekton kiujn oni povas admiri tie.

Je la 18a horo, 71 gefestenantoj sin metis ĉirkaŭ la belo kaj feste ornamitajn tablojn por ĝui JUBILEAN BANKEDON plej bongustan.

Baldaŭ la festa atmosfero de antaŭtagmezo denove regis inter la partoprenantoj kiuj - agrable babilante - forpasigis la tempon. Ne estis paroladoj; nur prezidanto Jaumotte paroladetiĝis por esprimi sian personan kaj sendube ankaŭ kies kontentecon pri la ĝisnuna bonega evoluo de la kongreso.

Jam de l' komenco de la bankedo malgranda orkestro aŭdigis agrablajn muzikon: modernaj melodioj tre konataj.

Ĉe la fino de la bankedo oni forŝovis plurajn tablojn kaj faris lokon por la dancemuloj kiuj baldaŭ plenigis la dancejon. Estis la momento por forgesi ĉiujn zorgojn kaj por - kune kun partnerino - moviĝi sur la ritmo de ensorĉiga muziko.

Fino S. Opsomer kaj S-ino Dewerchin flegis grandan loterion kun la tradiciaj premioj inter kiuj estis eĉ kelkaj surprizaj.

Krome ambaŭ esperantistinoj prizorgis butikon en angulo de la salono kie oni povis aĉeti plej diversajn kaj plej imponajn memorarojn. Ĝi altiris multajn aĉetantojn...

Noktomezo venis por ĉesigi la kongresan dancadon...

Lundo, TAGO DE LA EKSKURSO, ĉiam sunplena, estis konsiderata kiel ripoza tago.

Je la 10a horo ankoraŭ 64 gekongresanoj plenigis 2 aŭtoĉarojn sur la Rogierplaco. La prizorgantoj de la ekskurso disdonis stenciligitaĵojn klarigojn pri la kastelo de Gaasbeek kiun oni vizitus posttagmeze. Tra la norda parto de Bruselo, laŭlonge la fama Atomiumo, simbolo de la lasta Monda Ekspozicio de 1958, oni aliris la botanikan ĝardenon de Meise. Dumvoje denove S-ino Elly Staes lerte gvidis la ekskursantojn kaj ŝia komentario pri ĉiuj vidindaĵoj vekis vigran atenton.

La botanika ĝardeno estas ŝtata domeno en kiu troviĝas la kastelo de Bouchout, lasta loĝejo de la iama imperiestro de Meksiko, Charlotte.

Pro forpreno de parto de la tereno de la botanika ĝardeno en Bruselo - kaŭze de la norda-suda vagonara ligado - oni translokigis grandan vitran varmkulturejon al la parko de Meise.

Sub gvidado - kun S-ro Jaumotte kiel interpretanto - oni vizitis tian varmkulturejon kie oni povas admiri grandan kolekton de tropikaj kreskaĵoj aŭ plantoj el Azio, Afriko aŭ Sud-Ameriko.

Post tiu vizito kaj ĉar jam estis post tagmezo oni rapidis, pere de la aŭtobusoj, al la restoracio "Ancien Méli" por kontentigi la malsatan stomakon. En freŝa, agrablaejo, oni kune restadis, plej bona okazo por lastfoje adiaŭi. S-ro Jaumotte kun edzino kaj amikoj disiris tie. Antaŭe li diris lastajn vortojn, laŭdante la LKK-anojn kaj dankante ĉiujn kiuj helpis. Li konkludis ke la kongreso bonege sukcesis kaj ke li supozis ke ĉiu kongresano havas la saman impreson. Oni laŭte konsentis kaj varme aplaudis. Pluraj bruselaj amikoj kune kelkaj francinoj reveturis al Bruselo.

La resto de la ekskursantoj 51 personoj daŭrigis la vojaĝon tra la pitoreska kamparo de Brabanto. Oni povis plene ĝui la naturon kaj ĝian

belecon. La ŝanĝigantaj pejzaĝoj preterŝoviĝis preter la fenestroj de l'aŭtobusoj kaj la suno daŭre brilis...

Vizito al la kastelo de Gaasbeek kun ĝia historia pasinteco, la multvaloraj kaj artaj trezoroj, la belega arkitekturo kaj la impona parko ĉirkaŭe kun aleoj inter arboj preskaŭ centjaraj: jen tereno esplenda kaj ideala celo de iu semajnfina ekskurso. Estis amaso da homoj en la kastelo, en la parko kies ununura celo videble estis: travivi kelkajn distrajn aŭ ripozigajn horojn en kadro de naturbeleco.

Tro rapide, tro frue venis la revena horo. La aŭtoĉaroj forkondukis la lastajn gekongresanojn ree al la matena forirpunkto: Rogierplaco en Bruselo.

La kongreso finiĝis...

EPILOGO

La karakterizoj de la Kongreso estis jenaj: akurata informado de la kongresanoj per detalaj cirkuleroj ĝustatempe senditaj, vasta propagando en gazetoj, gravaj laborkunsidoj, kunigo de ĉiuj esperantistaj fortoj de la lando en tri fakaj kunvenoj tre sukcesintaj / junuloj, fervojistoj kaj instruistoj /, altnivela kultura vespero.

La fokuso de la kongreso estis la leĝopropono, kiu malfermas multajn eblecojn al nia Movado en Belgio. Tiu projekto de ministeria decido estis preparita de D-ro De Noël kaj kostis monatojn da laboro: pluraj personoj de ĉiuj partoj de la lando donis sugestojn kaj konsilojn por la kunmeto de la ampleksa dokumento. Dua grava elemento, kiu kontribuis plialtigi la prestiĝon de la kongreso, estis la prelego de L.E. la Ambasadoro R. Harry pri la uzo de Esperanto en diplomatio.

Koncerne la fakkunvenojn, mi scias, ke malgraŭ la ekzamena periodo almenaŭ dekkvino da junuloj kunsidis en la Hotelo. La fervojistoj havis fakprelegon kaj filmon pri la britaj fervojoj, prezentitan de angla fervojisto. BEFA malfermis sabate Esperanto-informejon en la Norda Stacidomo por akcepti la kongresanojn. Tria kunveno estis tiu de la instruistoj, kiun D-ro Denoël prezidis: el ĝi naskiĝis pedagogia komisiono, kiu estos ege utila por la laboro ĉe la aŭtoritatoj favore al la ministeria dekreto.

Al la Gazetara Konferenco, kiun la vendredon donis S-roj Jaumotte, Fighiera, Sielens kaj S-ino Jacobs en la ĵurnalista Domo, 50 gazetoj kaj informagentejoj estis invititaj: ĉiu invitito ricevis skribitan tekston de la faritaj deklaroj. Pluraj ĵurnalistoj venis al la Konferenco kaj la agentejo "Belga" sendis teleskriban komunikon al ĉiuj gazetoj tra la tuta lando, komuniko kiu poste aperis en diversaj gazetoj. La usona agentejo United Press petis resumon de la parolado de la Ambasadoro.

Dum la Arta Vespero ludis nur profesiaj aŭ duonprofesiaj artistoj. Rimarkinda estis S-ino van Walleghem, de la belga radio, kiu kantis en Esperanto, kaj ŝia filino Alice, harpistino de la Operdomo. La speciala poŝtstampo vekis grandan intereson ĉe filatelistaj medioj kaj multaj mendoj alvenis de neesperantistoj.

La Brusela estis kongreso de multaj neefektivigitaj planoj: la patro de la dua kosmonaŭto, Titov, /esperantisto/, kiun ni invitis, ne venis pro kormalsano; la akcepto ĉe Martini same ne povis okazi; la vizito

ĉe la Urbodomo estis nuligita en la lasta momento pro timo de studentaj manifestacioj /ne la esperantistoj timis, sed la polico/ ; S-ino Flego el Parizo /ĉefaktorino de la filmo "Angoroj"/ ne povis ludi pro la strikoj en Francujo ; la vizito al la Muzeo de Belaj Artoj ne okazis ĉar la antaŭvidita gvidanto ne sukcesis veni al la Kongreso. Do, se la Kongreso sukcesis, tio estis spite al amaso da malfavoraj cirkonstancoj. Kvin landoj estis reprezentitaj : Francujo, Germanujo, Nederlando, Britujo kaj Monako. Malgraŭ la striko, pluraj francoj sukcesis partopreni.

Raportantoj : J. Verstraeten kaj G. C. Fighiera

1968 Jaro de la homaj rajtoj

Fundamentaj "Homaj Rajtoj" kaj liberecoj

(Internaciaj labortagoj en Sonnenberg/Germanujo de 20.9 - 29.9. 1968)

EUGI (Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj) preparas internacian kunvenon, 20an ĝis 29a de septembro 1968 en la famkonata Sonnenberg (Harzmontaro) al kiu ni intencas inviti reprezentantojn de la landaj kulturministroj, eminentulojn de sindikatoj, reprezentantojn de la registaroj landaj, ktp., Sonnenberg estis fondita post la lasta milito kiel renkontejo de geinstruistoj el la tuta mondo. La Internacia Laborrondo Sonnenberg estas societo por akceli kunlaboron.

Por flegi ĝeneralan kaj politikan edukadon ĉiujare okazas dum la tuta jaro dektagaj internaciaj kunvenoj por plenkreskuloj kaj junuloj de diversaj politikaj kaj religiaj konvinkoj el ĉiuj rasoj, nacioj kaj profesioj. De 1949 ĝis la fino de 1966 jam 75000 homoj el 110 nacioj partoprenis Sonnenberg-kunvenojn.

Interkompreniloj ĝis nun ĉiam estis la angla, franca kaj germana lingvoj. Oni opiniis, ke sufiĉas la naciaj lingvoj. En interparoloj kun la prezidanto de Sonnenberg ni nun sukcesis kaj la estraro de Sonnenberg decidis gastigi nin kaj disponigi al ni sian tutan administracian aparaton. Por Sonnenberg tio estas unika eksperimento. Pro tio nia semajno en septembro 1968 devos fariĝi plena sukceso ! Se ni sukcesos en Sonnenberg, la oreloj de la gravuloj en Germanujo malfermiĝos. Sed pro la internacia reputacio de Sonnenberg efikos tio eĉ eksterlanden inter la "Instruistaro". Gravaj lernejoj kaj kulturaj instancoj montros ĉiun intereson.

Tial ni vokas la instruistojn de la mondo : Partoprenu, rezervu jam nun la tempon en septembro por Sonnenberg kaj anoncu vin baldaŭ !

La kadrotemo de la kunveno estos :

Fundamentaj "Homaj Rajtoj" kaj liberecoj

Prof. Lapenna kaj diversaj aliaj eminentaj esperantistoj preiegos. La restado en la komforta hejmo Sonnenberg peras krom la interesa tagordo ankaŭ interparoladojn kaj sufiĉe da libera tempo por promenadoj en la ĉarma ĉirkaŭaĵo, en la famkonata Harzmontaro. La kotizoj ne estas altaj, ili sumiĝos nur je 80.- gmk por dek tagoj (manĝadoj kaj tranoktiĝoj inkluzive).

Anoncu vin ĉe la EUGI-komisiito por la Sonnenberg aranĝo

Helmut Sonnabend, rektoro
3161 Dollbergen, über Lehrte
Germanujo

50-a JUBILEA BELGA KONGRESO

60-jara JUBILEO DE BRUSELA GRUPO

"Esperanto kiel lingvo por diplomatoj"

Parolado de Ralph Harry
(Ambasadoro de Australio)

Estimata Prezidanto, Samideanoj,
Amikoj :

Mi dankas vin pro viaj afablaj vortoj. Estas honoro por mi esti invitita fari paroladon je tiel grava okazo. Estas bone, ke eĉ en tagoj de politika krizo oni povas dediĉi kelkajn horojn al idalo.

Mi salutas super ĉio la landon de nia komuna sperto - **Esperantujo** - la landon de amikeco kaj paco. Antaŭ 60 jaroj Esperantujo estis la lando de la estonteco. En la pasinta duonjarcento spite de du mondmilitoj nia idealo realiĝis en la koroj kaj mensoj de centmiloj da homoj. Pli kaj pli ĝi estas aktuala afero.

La Sperto de 80 jaroj

Jes, en tiuj 80 jaroj la internacia lingvo mem multe progresis. Ĝi progresis pro tio, ke la aŭtoro de Esperanto, nia majstro, kaj la plej fruaj gvidantoj, kvankam ili fiksis la fundamenton, kreis flekseblan lingvon kaj tiel ebligis la kreskadon de nia literaturo, de niaj vortaroj kaj terminaroj, de niaj esencaj organizaĵoj.

Paradokse mi ĝojas, ke la registaroj ne oficialigis Esperanton antaŭ 60 jaroj, kiam nia febla movado ĵus ricevis kruelon baton de Sorto, la forpaso de Zamenhof mem. Mi bedaŭras, unufianke, ke la mondo ne komprenis la neceson de internacia lingvo, sed aliflanke mi timas imagante, kio povis okazi se en 1918 niaj kamaradoj estus invititaj tuj enkonduki Esperanton en la lernejojn, en la sciencoj, en la diplomation... en 1918 kiam Baghy kaj Kolocsay estis knaboj, kaj Lapenna nur infano.

Nun, en 1968, ni estas multe pli pretaj, sur multaj kampoj. Hodiaŭ, se la Ministro de Edukado invitus nin verki dekreton pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, ni estus pretaj.

Hodiaŭ, se sciencisto petus tradukon de rusa, aŭ angla scienca libro en Esperanton ne mankus bonaj tradukistoj.

Mi mem, kiel ambasadoro, kelkfoje demandas al mi ĉu la internacia lingvo estas preta por uzado kiel la lingvo diplomacia. Ĉu Esperanto taŭgas por interŝtata intertraktado, por interregistara konferenco, por la teksto de traktatoj ?

Unue mi ŝatus skizi por vi la esencon de la lingva problemo en diplomatio.

La Lingva problemo en diplomatio

Oni skribis multon pri la kosto kaj neefikeco de interpretado kaj tradukado en internaciaj konferencoj, kvankam la graveco de la problemo kaj la fakto ke solvo estas havebla, ne estas tiel bone konataj. Malpli bone konata estas, kiom la lingvobarilo, plialtigita de la reviviĝo de lingva naciismo, malhelpas la laboron de profesiaj diplomatoj, profesiuloj kun speciala kapableco, edukado kaj sperto sur la kampo de lingvoj.

Ambasadoro estas super ĉio la reprezentanto de sia lando. Ambasadoro devas kompreni la vidpunkton de la registaro apud kiu li estas akreditita, kaj sendi raportojn al sia registaro. Li devas ankaŭ reprezenti sian landon en komercaj kaj aliaj neoficialaj rondo, konatigi sian landon per paroladoj kaj kolekti informojn pere de diversaj kontaktoj.

En tiu agado lingvo estas tre grava faktoro. "Vortoj estas la armiloj de diplomatio."

La Metodoj de Diplomatio

La rimedoj de diplomatio por akiri informojn, por sendi ĝin al sia registaro kaj por agi laŭ siaj instrukcioj multe dependas de la buŝa parolo kaj de la skribita vorto.

La diplomatio ne estas scienco de ruzoj kaj trompado, nek de belaj aŭ audacaj spionoj. La plej fidindaj kaj fruktodonaj fontoj de informado estas la gazetoj kaj la radio, la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj kaj la oficistoj de la Ministrejo. El ili li ricevas suplementan informadon pri registaraj komunikoj kaj klarigojn de politiko.

Sed Ambasadoro kiu nur demandas informadon ne ricevas tiom da novaĵo kiom ambasadoro kiu povas konversacii. Li bezonas personan kontakton kun ministroj kaj oficistoj ne nur en iliaj oficejoj sed en la socio. Li devas koni eminentulojn, esti konata de ili - por tio lingvo komuna nepre necesas.

La tasko de diplomato estas ne nur informi sian registaron sed ankaŭ influi la registaron apud kiu li estas akreditita, per oficialaj vizitoj kaj neformalaj sugestoj. Okaze li devas diskrete influi publikan opinion kvankam li devas neniam interveni en la internajn aferojn de la gastiga lando.

Sed paroli ne estas ĉio. Diplomato devas fari protokolojn de siaj oficialaj konversacioj kaj raportojn kiuj citas la precizajn vortojn de lia kunparolanto. Ofte li donas al ministro noton aŭ "helpmemorilon" enhavantan la ĉefajn punktojn. Sed la unua respondo kutime estas buŝa, kaj se li estas sola li mem devas rememori ĉiun gravan vorton.

En intertraktadoj de skribita trakto sperteco pri verkado kaj kapableco sugesti formulojn por precizigi la tekston estas utilaj. Per sperto diplomato havas stokon de modelaj frazoj kaj klaŭzoj, kies signifo estas establita en la profesio.

La respondeco de diplomatoj en decidigaj intertraktadoj estas grava. Nunco de vorto povas rezultigi militon.

Evidente ambasadoro ne povas plej efike funkcii se li ĉiam devas uzi interpretiston. Li utiligas la servojn de traktadisto por fari finan tekston de grava noto, prelego aŭ traktato. Sed kiam ajn li povas, li senpere parolas.

La lingva problemo esta eĉ pli grava por diplomato pro la fakto, ke li devas deĵori dum sia kariero, en diversaj landoj, ofte en landoj kiuj havas tre malsimilajn lingvojn.

La lingvoj de la diplomatio

En la pasinteco la laboro de diplomatoj estis faciligita per komuna profesia lingvo. La latina estis la lingvo

de diplomatio kaj traktatoj dum preskaŭ 2.000 jaroj. En la 15-a jarcento oni komencis uzi la francan por traktatoj, kune kun la latina, sed la teksto de traktatoj restis latina ĝis la 18-a jarcento. En 1753 la brita registaro asertis, ke "ĉiuj ajn nacioj havas raton intertraktadi en neutrala lingvo"!

Ekde la komenco de la 19-a jarcento, tamen, la brita registaro postulis, ke diplomatoj en Londono uzu la anglan. En la mezo de la jarcento Palmerston insistis, ke britaj ambasadoroj uzu la anglan kaj pretendis, ke ĉiu ŝtato havas la raton uzi sian propran lingvon. Usono subtenis tiun principon.

Plejofto diplomatoj en la 19-a jarcento uzis la francan kiel komunan lingvon en konversacio, kaj por oficialaj komunikadoj kaj dokumentoj ankaŭ.

Post la pactraktato de Versajlo, la Ligo de Nacioj donis egalan staton al la angla kaj franca lingvoj, kaj la praktikado de "multflanka" diplomatio en internaciaj organizadoj influis kutimojn en la tradicia "duflanka" diplomatio vivo. La ŝtatoj kies lingvoj estas oficialaj en Unuiĝintaj Nacioj kaj la specialigitaj organizadoj insistas, ke diplomatoj uzu iliajn lingvojn en la ĉefurbo ankaŭ.

La Malfacilajoj de Nuntempa Praktiko

La nova multeco de lingvoj uzataj en diplomatio kaj la manko de komuna lingvo eĉ por konversacio aldonis al la malfacilajoj de diplomatoj kaj malpliigis ilian efikecon. Diplomato nun ofte devas paroli en lingvo kiu estas nek lia patrina nek lia pli bona fremda lingvo.

Ŝtatestroj en la 19-a kaj pli fruaj jarcentoj estis plejparte membroj de reĝaj familioj kiuj scipovis plurajn lingvojn. Ili povis interkomuniki inter si kaj ankaŭ kun la ambasadoroj akredititaj apud ili. Nun la ŝtatestroj kaj ĉefoj de registaroj estas plejofte prezidantoj kaj kelkfoje ili ne parolas fremdajn lingvojn. En multaj konferencoj "je la supro" la eminentuloj dependas absolute de siaj interpretistoj.

Ministroj pri Eksterlandaj Aferoj kelkfoje lernis unu aŭ du lingvojn, sed ofte eĉ ili scipovas nur sian propran, super ĉio kiam ĝi estas unu el la "grandaj" lingvoj.

La Ministrejo pri Eksterlandaj Aferoj ofte akceptas diplomatiajn notojn nur se ili estas en la oficiala lingvo. Eĉ se ili akceptas oficialajn dokumentojn en aliaj lingvoj, povas esti prokrasto se ne kuniras almenaŭ traduko en surloka lingvo.

Konversacioj inter diplomatoj, utila metodo konfirmi aŭ interŝanĝi, nun estas eblaj nur se diplomato povas trovi komunan lingvon kun sia kolego.

Eblaj solvoj

La evoluo de la moderna mondo pliiĝis la neceson de profesiaj diplomatoj. Por vere efiki ili bezonas komunan lingvon.

Estas tri teorie eblaj solvoj:

(a) **reiri al la latina.** Tio ne estus praktika. La Romkatolika Eklezio ankoraŭ uzadas la latinan, la internaciaj juristoj kelkfoje citas latinajn proverbojn, sed la latina ne estas multe legata kaj eĉ malpli skribata kaj parolata.

(b) **akcepti unusolan nacian lingvon.** Interkonsento pri la supereco de unu nacia lingvo ne estas verŝajna. Eĉ se oni povus konsenti ke unu lingvo havas kelkajn avantaĝojn, elekto de nacia lingvo donus neĵustan avantaĝon al la ŝtato au ŝtatoj kies patrina lingvo ĝi estas.

(c) **favorigi neŭtralan lingvon.** Ne estus tre utile preni malgrandan nacian lingvon ekzemple la islandan kiel bazon. Logiko sugestas la avantaĝojn de sistemigita kaj facile lernebla lingvo. Esperanto estas la nura speciale planita internacia lingvo kiu estas pruvita. Ĝi povus funkcii tuj, kune kun naciaj lingvoj, por konversacio kaj duonoficiala uzado. Sed ĉu ĝi akiris la teknikan vortaron kaj stokon da precedentoj necesaj por uzado en formalaj notoj kaj traktatoj? Ĉu, en la jubilea jaro de Sonorilo, kaj de la Brusela Grupo, ĉi-tie en la 50a Kongreso de la Belga Esperanto-Federacio ni povas aserti: "Esperanto estas taŭga komunikilo por la diplomatoj?"

La Evoluo de Esperanto kiel Diplomatio Lingvo

Kio estis la situacio de Esperanto rilate la diplomation antaŭ 60 jaroj?

Kompreneble ĉiu Esperantisto estas ambasadoro kiam ŝi (aŭ li) vojaĝas eksterlanden. Kompreneble multaj pioniroj estis ankaŭ diplomatoj. Zamenhof, en siaj festparoladoj elmontris altan gradon de diplomatia kompetenteco. Sed tamen antaŭ 60 jaroj estis treege malmulte da modeloj por profesia diplomatiisto.

Tiam komencis tiu epokfaranta laboro de la juna sviso, Edmond Privat en Genevo, en la fruaj tagoj de la Ligo de Nacioj. En la libro de Daniel Varré "La Ridanta Diplomato", li menciis ke Privat parolis en komitato de la Ligo pri Esperanto, eĉ parolis en tiu lingvo. Li persvadis la Organizadon pri Telekomunikiloj akcepti Esperanton. Oni persvadis la Internacian Labor-Oficejon eldoni bultenojn. Oni tradukis la Konstitucion de la Ligo de Nacioj en Esperanton... mi posedas ekzempleron de tiu tre grava dokumento.

Sur tiu fundamento Privat kaj aliaj konstruis - en siaj artikoloj, radio-prelegoj kaj libroj, ekzemple en "Federala Sperto". Antaŭ la dua mondmilito jam ekzistis kadro en kiu oni povus konstrui la necesan precizan fakan terminaron. La Organizado de la Universalaj Kongresoj ankaŭ pliboniĝis - ili jam povis doni ekzemplon al la organizantoj de oficialaj interŝtataj kunvenoj.

Post la dua mondmilito tiu progreso daŭris. Ivo Lapenna verkis "Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo". Li persvadis UNESKO agnoski la valoron de Esperanto kaj akcepti la Universalan Esperanto-Asociacion kiel kunlaborantan organizadon en konsultaj rilatoj. Oni tradukis la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj, kaj la Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj la konstituciojn de multaj landoj. Por diplomato tiu estis tre stimula kaj ekscita periodo. En Genevo, en la jaroj 1953-56 la tutmondaj organizadoj pri Laboro, Sano, kaj Meteorologio, la interregistara komitato por Eŭropa miĝrado, kaj aliaj instancoj eldonis broŝurojn. Multaj registaroj aŭ landaj asocioj eldonis libretojn pri internaciaj politikaj problemoj.

SEKVO EN VENONTA NUMERO

U.E.A. 60-JARA

I

Ĉiu, kiu objektive rigardas la amplekson kaj formojn de internaciaj rilatoj en la hodiaŭa mondo, facile povas konstati, ke la homaro ĉiam pli kaj pli bezonas rimedon de komunikado. Estas klare, ke tiun bezonon povas plene kontentigi nek unu aŭ pluraj naciaj lingvoj, nek la nuntempaj sistemoj de tradukado kaj interpretado, nek la plej modernaj tradukmaŝinoj, sed sole vivanta, maksimume nuancita, plensanga kultura lingvo. Bazante sin sur tiuj du premisoj kaj konante la nunan evolustadion de la Internacia Lingvo kaj ĝiajn senfinajn evolu-eblecojn, la neŭtrala Esperanto-Movado, organizita en Universala Esperanto-Asocio, fidus, ke ĝuste la Internacia Lingvo prezentas la solvon de la lingva problemo en mondaj kadroj kaj ke tial pli aŭ malpli frue devos veni la tempo kiam ĝi estos aplikata en ĉiuj internaciaj rilatoj, sur ĉiuj niveloj.

Estas malfacile antaŭvidi kiam precize la uzo de la Internacia Lingvo ĝeneraligos, ĉar tio dependas de multaj faktoroj, el kiuj la plej granda parto troviĝas tute ekster la atingopovo de la Esperanto-Movado, sed tute certe la kondiĉoj por tio ĉiam pli maturiĝas. Tial estas eble almenaŭ ĝis certa grado influi la solvon kaj plirapidigi la procezon per konsiderinda altigo de la nombro de personoj sciantaj la lingvon, kio aŭtomate vastiĝas la kampon de ĉiaspecaj praktikaj aplikoj kaj, krome, ebligas ankaŭ konscian vastigon de tiuj praktikaj utiligoj. Siavice tio devas plimulti kaj fortikigi ĉiujn Esperanto-organizojn, sekve ebligi novajn agadojn kaj intervenojn kun pli da efiko, kio ne povas ne reflektiĝi en la plua disvastiĝado de la lingvo. Kiel oni vidas, ĉio-ĉi estas firme kunligita, sed estas necesa la elemento de konscie organizita agado por sukcesplene rapidigi la funkciadon de tiu maŝinaro de reciproka influado. La nova Baza Laborplano de UEA plenumas tiun taskon.

II

En aprilo de tiu ĉi jaro UEA fariĝis 60-jara. La Estraro decidis ne celebri aparte tiun eventon, sed prefere utiligi ĝin por fortikigi la Asocion kiel eble plej multe. Tiucele estas utile diri almenaŭ kelkajn vortojn pri la ĉefaj agadoj de la Asocio en la nuna periodo. Ili povas esti dividitaj je kvar bazaj grupoj, kiuj tamen estas reciproke dependaj kaj apogantaj unu la alian.

Al la unua grupo apartenas tuta aro de agadoj sur la kampo de dokumentado kaj informado. Menciindaj estas unuavice la esplorkomisionoj farataj de CED pri ĉiuj aspektoj de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, kaj la dokumentoj, kiujn eldonas CED rezulte de tiuj esploroj. Kutime la dokumentoj de CED aperas en Esperanto kaj en la angla, sed unuopaj, pli gravaj dokumentoj, ekzemple nun la dokumento CED/7, aperis en konsiderinda nombro da naciaj lingvoj. Fine de tiu ĉi jaro CED komencos eldonadi unuarangan revuon La Monda Lingvo-Problemo kun elstaraj artikoloj en diversaj naciaj lingvoj kaj kun resumoj en la

Internacia Lingvo. La informa fakto de UEA regule eldonas apartan Buitenon kun freŝdataj gravaj informoj pri la atingoj de Esperanto. Ĝi estas publikigata en Esperanto, en la angla kaj en la franca, sed, pere de la landaj informaj faktoj, ĝiaj novaĵoj aperas en multaj aliaj naciaj lingvoj. Dum la universalaj kongresoj funkcias la Kongresa Gazetara Servo, kiu informas en Esperanto kaj en la lingvo de la kongresa lando pri ĉiuj eventoj dum la koncerna kongreso. Ĝi ankaŭ prizorgas disaŭdigojn per radio kaj televidajn programojn. UEA eldonis en pluraj okazoj informajn flugfoliojn el kiuj la plej konata estas la seslingva informilo kaj la flugfolio por universitatoj. Afiŝoj de Unesko kun Esperanto-teksto, eldonitaj en kunlaboro kun Unesko, aliaj apartaj afiŝoj en du formatoj por la uzo de la landaj asocioj kaj lokaj grupoj prezentas plian kontribuon de UEA al informado. Fine, pluraj mondskalaj kampanjoj—ekzemple tiu de 1959 okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, tiu de 1965-66 okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, kaj la nuna okaze de la Jaro de la Homaj Rajtoj—havis kaj havas ankaŭ grandegan valoron el vidpunkto de informado.

Evidente, ju pli da kulturaj valoroj kreitaj en Esperanto aŭ pere de ĝi, des pli granda la kultura valoro de la lingvo mem; krome, des pli perfekta fariĝas la lingvo kiel arta esprimilo. Tial UEA dediĉas grandan atenton al kulturaj agadoj. La ĉiujaraj Belartaj kaj Oratoraj Konkursoj, la regulaj sesioj de Internacia Somera Universitato, la ĉiam pli oftaj Internaciaj Artaj Festivaloj, la Magnetofona, Filma kaj aliaj Servoj, la bonega libroserio Oriento-Okcidento, diversaj gramafonaj diskoj, tri bonege redaktataj revuoj en modela Esperanto estas la plej gravaj el la agadoj de UEA en la sfero de kulturo.

Paralele disvolviĝas la laboro en la tria grupo: tiu de instruado. Kompreneble, la centraj organoj de la Asocio ne povas mem instruadi la lingvon, sed UEA kunligas la lernejojn, en kiuj Esperanto estas instruata, pere de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj. Trifoje jare aperas la Lerneja Bulteno. Lernejoj konferencoj, organizitaj de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj, respektive sub aŭspicioj de UEA, okazis en Beogrado kaj en Graz. UEA atente sekvas la instruadon de Esperanto en la lernejoj kaj nun planas novan agadon favore al Interŝtata Konvencio pri laŭgrada enkoduko de Esperanto en la lernejojn de kelkaj landoj.

UEA kreis efikajn servojn por la praktika utiligo de la lingvo. La plej konata estas la impona delegita reto, unika en la tuta mondo. Pli ol 3 400 lokaj kaj fakaj delegitoj en sesdeko da landoj estas je dispono de la membraro de UEA por ĉiaspecaj praktikaj servoj. Oni kalkulas, ke la delegitoj de UEA faras ĉiujare ĉ. 20 000 praktikajn servojn. Krome, diversaj internaciaj fakaj kaj specialigitaj organizoj, aligitaj al UEA aŭ ligitaj al ĝi per kontraktoj, siavice utiligas la lingvon por fakaj celoj.

III

La tuta multflanka kaj grandega laboro de UEA estas efektiva per minimumaj financaj rimedoj. La ĉefa enspezo estas la kotizoj de la membraro, unuavice de la t.n. membroj-abonantoj (MA), kiuj ricevas la 600-paĝan Jarlibron de la Asocio kaj la grandformatan revuon Esperanto.

En la Jubilea Jaro de UEA estas necese konsiderinde altigi la nombron de MA. Jam kelkajn jarojn tiu nombro turniĝas ĉ. 7 000. Se la Asocio povus atingi 10 000 MA en 1968, tio ne nur solvus ĉiujn ĝiajn financajn problemojn, sed ankaŭ ebligus vastigi la agadojn kaj pligrandigi la revuon Esperanto sen altigo de la kotizoj. Se ĉiuj, kiuj legas tiujn ĉi liniojn, tuj renovigas sian kotizon, aŭ, se ili ankoraŭ ne estas MA de UEA, tuj aliĝas al tiu kategorio de membreco, ili faros grandan servon al UEA kaj al si mem. Ju pli forta estas UEA, des pli sukcese ĝi povas plenumi siajn taskojn kaj des pli da praktikaj servoj ĝi povas prezenti al la membraro.

Helpu fortikigi UEA en ĝia Jubilea Jaro per tuja aliĝo kiel individua membro en la kategorio MA.

(el : Brita Esperantisto)

Ivo Lapenna

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit” vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 37.88.20

3-a KARAVANO AL LA SUNO

Kongreso de Madrid 1968

Dimanĉo la 28.7.68 forveturos de Bruĝo 26 gepartoprenantoj de la Belga Karavano. Inter ili 6 Britoj, 2 nederlandanoj, unu francino kaj 5 junuloj de la junulargrupo Sint-Kruis. Ĝis la 18.8.68.

Esperanto - Junularo

TRI KOMUNIKOJ

1. Verviers :

la klubo de la junaj Esperantistoj en Verviers organizis brilan festvesperon vendredon la 28.6.68 en la reĝa ateneo. Raporto aperos en la venonta numero.

2. Bruselo :

tria seminario internacia por gvidantoj okazos en Bruselo de la 25.8 ĝis la 31.8.68, junulargastejo Sippelberg; organizita de TEJO sub la aŭspicioj de "Union des Associations Internationales UAI".
Informojn donas : S-ro R. Van Humbeek, Dambrugestraat 26 Antwerpen.

3. Bruĝo (Sint-Kruis) :

festo okaze de la kvinjara ekzistado de la junulargrupo Sint-Kruis - semajnfino de la 28/29.9.68 : ekspozicio - salutoj - balo - oficiala akcepto - kontakto kun la junular - komitato de Sint-Kruis - ekskurso : 100 F por gejunuloj malpli ol 21 jara (enkluzive vespermanĝo kaj tranoktado en la hejmoj de la gemembroj, enirprezo por balo kaj ekskurso)
Informojn : Paul Blondelle : L. Debruynestraat 67 Sint-Kruis.

ROTARIO KAJ ESPERANTO

Post la interesa tiutema artikolo de la pasinta numero de "SONORIO", mi eluzis la unuan okazon por sondi la eblecojn de kunlaborado sur la loka tereno.

En aprilo 1968 okazis, en Liège, la Jara Konferenco de Rotario (Distrikto Belgio-Luksemburgio). Mi sendis saluttelegramon al ĝi. Alvenis al mi dankletero de la Distriktestro (pli precize Guberniestro). La letero estis tre afabla, sed en ĝi estis frazo, kiu iom tiklis min, nome: "La Rotarianoj klopodas uzi ununuran lingvon: tiu de la amikeco kaj de la kompreno inter la popoloj".

Mi respondis longan leteron, en kiu mi sciigis la Distrikestron, ke en tiu frazo mi volas nur vidi la paralelan vojon de niaj ambaŭ movadoj, kaj ne ian aludon al la senutileco de la klopodoj por la Lingvo Internacia. Mi interalie parolis pri la malfavoraj efikoj de la nereкта dialogo kaj de la lingva diskriminacio sur la interkompreniĝon inter la popoloj - kaj ne nur inter plurlingvaj elitoj.

Mi krome proponis eventualan kunlaboron inter niaj movadoj. La 2-an de majo, S-ro Robert DESSARD, la Distriktestro, respondis per nova tre afabla letero, kiu tekstas jene:

"La deklaro, kiun mi faris en mia letero de la 25-a de aprilo - kaj vi ĝuste ĝin komprenis - tute ne celis esprimi dubon pri la valoro de viaj klopodoj por disvastigi Esperanton. Tiuj ne povas trovi ĉe ni ian malamikecon, tute male.

Mi tre sincere dankas vin pro via propono pri la kunlaborado. Sed mi kredas ke tiu kunlaborado povus esti sukcesplena nur ĉe la superaj instancoj de la Internacia Rotario, kiuj estas influataj ĉefe de ia multnombraj kaj potencaj usonaj kluboj.

Esperante, ktp..."

Ni konas do la direkton de niaj estontaj klopodoj.

D-ro P. DENDEL

BIBLIOGRAFIO

Margid Thoraes-Ekström: "Brilo de Fantomo". Eldonita de Dansk Esperanto-Forlag ĉe S-ano Friis en Aabyoj, Danujo. 72. Prezo: 7,50 Dan. Kronoj.

Jen unu de la tre malmultaj esperantoverkoj kiuj ricevis en la revuaro malfovan kritikon. Estas ja multaj kaŭzoj por tio. La tuta priskribita vivo estas seninteresa... eble ne por la aŭtorino mem kaj por kelkaj konatuloj ŝiaj. La tuta rakonto povus reduktiĝi de 72 al ĉirkaŭ 10 paĝoj se oni ellasas la longigojn, inter kiuj eĉ preĝoj. La revado pri koboldoj kaj spiritoj estas infaneca. Kaj tamen, malgraŭ ĉio tio, la libro estas tia ke ĝi plaĉas al kelkaj difinitaj personoj. Al tiuj kiuj ŝatas la simplajn aferojn en la vivo: la ripozo en bieno meze de bela naturo: la simplaj sentoj de amikeco, de koreco, de nekomplikita amo, revado kaj rememorado, infaneca fantazio, kaj al kiuj ne gravas la ripetadoj. La kelkaj preseraroj ne ĝenas.

Ni ricevis por recenzo, kiu aperos en venonta numero:

- 1) Ch. Baudelaire: "La Spleno de Parizo" (poemoj en prozo) en traduko de Paul Lobut. Tre bela eldono de KOKO en Kopenhago.
- 2) fama Pola romano de Eliza Orzeszko "Marta" en traduko de D-ro L. Zamenhof. Ekzemple de la romantika roman-arto. Tre bela eldono de la "Editions Françaises d'Esperanto"-direktoro André Ribot en Marmande, Francujo.

JEKS (Japana Esp.-Korespondo-Servo) estas preta plenumi vian deziron trovi leteramikojn el Japanio.

Aparta, bele afrankita letero kun bloklitere skribita adreso kaj senmanka konciza sinprezento estas multe pli alloga ol nura listo de adresoj.

JEKS, ĉe KLEG, Nakuta-hamadōri 3-10, Coyodo-ku, Ōsaka, Japanio

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"
Kunsidoj: Ĉiuvendrede en Brasserie
"Capitole", Gemeentestraat 15
Antwerpen je la 20,15a horo.
Postĉeknumero: 726.54.

La 5an de aprilo S-ro R. Balleux, kiu libertempis en Vieno, montris la rezultojn kaj raportis pri tiu restado en la aŭstra ĉefurbo dum parolado kiun li faris sub la titolo "Restado en Vieno". Ĉar estis ankaŭ la datreveno de l'naskiĝo de Prez. Jaumotte, S-ro J. Verstraeten gratulis lin kaj, nome de la grupo, transdonis malgrandan donacon. Oni vigle aplaudis la Prezidanton.

La 12an oni faris vojaĝon al la Lazura Marbordo en Francujo. Almenaŭ laŭ belegaj diapozitivaj kun komento de S-ro Fr. Schellekens kiu paroladis pri sia lasta vojaĝo en Sud-Francujo.

La 19an S-ro Paul Peeraerts paroladis pri "Peruo", admirinda lando en Sud-Ameriko. Planoj, desegnaĵoj, lum-bildoj kaj fotografajoj, estis la materialoj. S-ro Peeraerts sukcesis doni al la ĉeestantoj ĝeneralan ideon pri la enloĝantoj kaj ilia ankoraŭ primitiva vivmaniero. La juna paroladisto uzis perfektan lingvon.

La 26an venis gasto el Bruselo por paroladi pri "De Barcelono ĝis Tomolinos". S-ro Dekrom, agrable surprizis siajn aŭskultantojn per diapozitivaj belege sukcesintaj.

La 3an de majo S-ro Van Eynde daŭrigis la prezentadon de dokumentaj filmoj. En la serio troviĝis unu filmo esperantigita de S-ro Paul Peeraert, kiu ĝin tradukis kaj parolis. Temis pri "La eŭropa lernejo en Bruselo". S-ro J. Montmirail respondecis pri la teknika realigo.

La 10an en la kadro de la kulturaj aktivecoj de la grupo S-ro I. Durwael paroladis pri "Eŭropo kaj ĝia Movado". Li faris la historion de tiu movado. La ĉeestantaro tiom interesiĝis ke post la parolado ekestis preskaŭ debato pro la diversaj ideoj kaj opinioj kiujn oni aŭdiĝis.

La 17an S-ro E. Riadis, kiu dum 2/3 de la jaro restadas en Grekujo, faris interesan paroladon pri la "Athosmonto" kaj la Athos-insulo, kaj pri la norda parto de Grekujo. S-ro De Graeve, bona konato de la paroladistino, montris tutan serion da memverkitaj diapozitivaj kiuj havas ankaŭ artan valoron.

GRUPA VIVADO

La 24an S-ro J. Verstraeten paroladis pri "Kiel kaj kial mi esperantistiĝis". Li verve kaj detale priskribis siajn unuajn kontaktojn kun la vivo de plenkreskulo kaj tiel tiuj travivaĵoj igis lin dediĉi sian tutan liberan tempon al Esperanto jam de antaŭ preskaŭ 20 jaroj.

La 31an oni denove sidis "Ĉirkaŭ la Fajro", t.e. ke en amika rondo oni rakontis aŭ prelegis aŭ paroladis pri kiu ajn temo. S-ro R. Van Eynde, per diapozitivaj verkitaj de arkitekto, rakontis pri kaj montris la terurajn sekvojn post la fama brulo de la historia St Paŭlo preĝejo en Antwerpen antaŭ kelkaj semajnoj. F-ino A. Geelen konigis pli bone "Grajnoj en Vento", la fama desegnata gazeto por kaj per infanoj. Multaj ĉeestantoj miris pri tiu aktiva entrepreno.

La 1/2/3an de junio 25 verdstelanoj partoprenis al la 50a Belga Esperanto-Kongreso en Bruselo.

La 7an oni raportis pri tiu kongreso: F-ino A. Geelen, S-roj M. Jaumotte R. Balleux, I. Durwael, J. Lernout, E. Paesmans kaj J. Verstraeten. F-ino A. Geelen, por la unua fojo, koordinigis kaj gvidis la tuton.

Dimanĉon, la 9an, 36 verdstelanoj partoprenis al aŭtoĉarekurso al Ronquières. La vetero estis belega, la suno brilis kaj la bonhumoro de la partoprenantoj estis proporcia. Laŭ Bruselo, Nivelles kaj La Louvière oni aliris Houdeng-Gougnies kie oni vizitis la konstrajn de la ŝipliftoj. Tra la ĉiam sunplena pejzaĝo oni alvenis en Ronquières kie oni unue tagmanĝis antaŭ ol viziti la deklinan konstruaĵon, t.e. parto de la kanalo Bruselo/Charleroi kie oni, laŭ novmoda kluzo, veturigas ŝipojn de malalta al alta akvonivelo aŭ inverse. Estas impona konstruaĵo kie la belgaj inĝenieroj kaj industrioj montras sian kapablecon.

En Halle S-ro E. Paesmans donis detalajn informojn pri la preĝejo en fru-gotika stilo kiun oni vizitis. En la provinca bieno Huizingen kun bela parko oni restadis dum longa tempo.

S-roj R. Van Eynde kaj E. Paesmans planis la tuton.

La 14an S-ro R. Van Eynde denove prezentis dokumentajn filmojn: unu

estis en Esperanto: "Neĝo kaj Vojoj". La specialisto, S-ro P. Peeraerts tradukis la tekston kaj parolis ĝin. S-roj J. Montmirail kaj R. Van Eynde flegis la teĥnikon. Dum tiu ĉi vespero, diplomoj pri elementa kapableco estis transdonitaj al S-roj Eddy Frederickx kaj Steven Van Daele. La unua, pro memstudo, kaj la dua, pro malsaneco (do neebleco partopreni al la normala ekzameno) estis ekzamenitaj antaŭ kelkaj semajnoj en ĉeesto de S-roj H. de Roover, E. Paesmans kaj J. Verstraeten. La 2 kandidatoj brile sukcesis.

S-ro H. de Roover alparolis lastfoje siajn "lernantojn" post kio S-ro E. Frederickx dankis. Kiel respondo al la grupa gratulletero okaze de sia 60-jara ekzistado U.E.A. sendis dankleteron al la grupo; S-ro Durwael lerte kaptis okazon por ankoraŭfoje propagandi la individuan membrecon de U.E.A.

FAMILIA VIVO :

Geedziĝo : Kun plezuro ni ekscias la geedziĝon de niaj fidelaj gemembroj: S-ro Jo Haazen kaj F-ino Imelda Wuyts.

Jo Haazen, famkonata sonorilaristo kiu jam dufoje gajnis la premion de Hilversum en la sonorilarista konkurso ĉiam estas preta propagandi Esperanton en siaj medioj. Lia lasta gramafondisko kun sonorilara muziko de la katedralo en Antverpeno donas klarigojn sur la koverto en kvin lingvoj; Esperanto estas la unua lingvo.

Al ambaŭ niaj geamikoj: niajn elkorajn gratulojn kaj bondezirojn por daŭra feliĉo.

La 18an de majo edziĝis al ĉarma fraŭlino: la filo de alia fidela membro, S-ro P. Smets. Al la juna paro, al Ges-roj J. Smets kaj la familio niajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn.

NASKIĜO : Feliĉa avinjo, S-ino J. De Hondt, anoncis al ni pri la naskiĝo de sia nepineto An, filino de Ges-roj H. De Hondt-Driessens. Ili ĉiuj estas gemembroj de "La Verda Stelo" kaj la ĵus naskiĝintino ankaŭ tuj almembriniĝis al nia grupo pere de sia Avinjo! Bravo! Dankon!

HONORIGO : Okaze de sia pensionumo S-ro G. Debacker, fidela membro jam de pluraj jaroj, estas honorigita en la akceptejo de la Flandra Operdomo, al kiu li estas ligita en la orkestro kiel "celisto"! Ne estis tutsimpla pensionumo: samtempe oni festis - escepta kaj neniam plu revenanta fakto - lian 50-jaran daŭran deĵoradon en la Operdoma servo. La grupo sendis florojn kaj pluraj amikoj/gemembroj sendis telegramon. Al nia amiko G. Debacker al lia ĉarma edzino kaj al la familianoj niajn plej korajn bondezirojn kaj gratulojn.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92 Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

BRUSELO

DIAMANTAJ GEJUBILEANTOJ : (60 jaroj)

61 -jara membreco de S-ro DERKS Joseph
60 S-no DERKS Pélagie

ORA JUBILEANTO : (50jaroj)

57 -jara membreco de S-ro MATHIEUX Fernand

ARGENTAJ GEJUBILEANTOJ : (25 jaroj)

49 -jara membreco de S-ro DAEMS Maurice
44 S-ro BAS Lodewijk
43 S-ro CASTEL Hector
43 D-ro KEMPENEERS Paul
42 S-ino CASTEL Lucy
40 S-ino DAEMS Marguerite
40 D-ro MAES Raoul
39 S-ro ALOFS Jules
38 S-ro LAMBERTS Victor
38 S-ino STAES Elly
36 F-ino KESTENS Mathilde
36 S-ino PLYSON Julia
35 S-ro VERBRUGGHEN René
33 S-ro OLEFFE Jean
32 S-ino GORGEMANS Dora
32 S-ro van der STEMPER David
32 S-ino van der STEMPER Rita
29 S-ino ERNST Elfriede
25 S-ino LECAT Rena

63-jara esperantisteco de
S-ino STAES Elly (1905)

Programo de la estontaj kunvenoj, ĉiulunde je la 20a horo en hotelo "Exclior" strato de la Progreso 7.

Julio: parolata ĵurnalo; 8a: S-ino Jacobs komentarios la libron "Freŝa Mateno" de Reuven Kritz. 15 a: perfektiga kurso de S-ro David Van der Stempel. 22a: S-ino Dewerchin komentarios libron "Kon-Tiki" de Thor Heyerdahl. 29a: debatvespero.

Aŭgusto. 5a parolata ĵurnalo. 12a: S-ino Marg. Daems komentarios libron de Cezaro Rossetti "Kredu Min, Sinjorino". 19a: S-ino Elfriede Ernst komentarios libron de Brice Maxwell "Anstataŭa Edzino". 26a: S-ino Fighierra raportos pri la kongreso de Madrid.

Septembro. 2a: parolata ĵurnalo 9a: novaj rakontoj de S-ino Elly Staes pri malnova Bruselo. 16a: perfektiga kurso fare de S-ro Van der Stempel. 23a: F-ino S. Opsomer komentarios la libron "Frisaj Rakontoj... 30a: debatvespero

Noto: se dum la libertempaj monataj eksterlandaj samideanoj volas viziti nin kaj rakonti aŭ prelegi, ni volonte donos tiun eblecon anstataŭ la antaŭvidita programo.

KORTRIJK

Tie ne grupo sed izoluloj laboras; precipe nia prezidanto de la Nederlandlingva sekcio de BEF, S-ro G. De Brouwere. La 15-6-'68 li akceptis la grupon de Tourcoing kaj aranĝis belan kunvenon en kiu li montris siajn belegajn diapozitivojn pri sia vojaĝo al Nepalo kaj Hindujo.

RABATO POR ESPERANTISTOJ

manufakturajo ĉirkaŭ DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ **" MAGDELEINE "**

deponita kvalitmarko

por la eleganta sinjorino

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej

altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
	Leysstraat 10
Arlon	: 12 Marché-aux-Légumes
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Anspachlaan 194
	Oude Kleerkoperstr. 31
Gent	: Brabantdam 21
Herstal	: 4 Rue Large Voie
Leuven	: Bondgenotenlaan 13
La Louvière	: 16 rue Albert 1er
Luxembourg	: 67 Place de la Gare
Mechelen	: IJzeren Leen 32
Oostende	: Kapelstraat 23
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: 75 Rue Royale
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: 2 Pont St. Laurent
Wetteren	: Jos Buyssestr. 39-a